



## La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia aprila kunveno

**Dato:** Vendredon, la 21-an de aprilo 2006, 6:30-9:00 pm

**Loko:** United Federation of Teachers  
50 Broadway, Second Floor, Room A  
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

**Programo:** 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Bone konata rusa esperantisto Mikaelo Bronŝtein parolos pri “SEJM legenda,” la junulara movado en Rusio. ★

### Protokolo de la kunveno de la 17-a de marto 2006

Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon je la 7-a horo. Entute ĉeestis 15 personoj, inkluzive gaston Krishnan SHAN. La protokolo de la februara kunveno estis akceptata.

Stuart anoncis, ke Cynthia RICHARDS, esperantistino el Old Brookville, telefonis al li kun saluto. Stuart menciis, ke Cynthia estas bahaisto, kaj ke la Bahaa nova jaro komenciĝos la 20-an de marto.

Ni poste diskutis proponojn por temoj de la venonta prelego de Mikaelo BRONŝTEIN, rusingva esperantisto, kiu vizitos nin aprile.

Poste Tomaso ECCARDT parolis pri sia nova Esperanto-klaso. Sep aŭ ok personoj konsentis ĉeesti ĉe la unua leciono, sed nur tri venis. Feliĉe Marta BERGONZOLI kaj amikino alvenis por ke Tomaso povu okazigi klason.

Stuart memorigis al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis la societan kotizon por 2006, ke ili pagu kiel eble plej baldaŭ.

Tomaso poste petis ideojn por venontaj prelegoj. Li invitis al iu ajn, kiu volus prelegi ĉe venonta formala kunveno, kontakti lin pri tio.

Tomaso diris, ke Susan KOHN sciigis lin pri venonta poezia kunveno pri endanĝerigitaj lingvoj, ebla okazo por ni legi esperantlingvajn poemojn kaj paroli pri nia lingvo.

Poste Tomaso menciis, ke nia iran-devena amiko Asghar SAJADIAN ĵus kontaktis lin. Li nun estas en Jerevano, Armenio, kaj baldaŭ reiros al Aŭstrio.

Tomaso fine anoncis, ke oni subskribis la kontrakton kun FIT por la Jarkongreso de ELNA. Oni nun daŭre planas pri la multaj aliaj aferoj rilate la kongreson.



Nijl BLONSTEIN diris, ke aŭstria ĵurnalo aŭŝis enketon sur sia retpaĝo, pri la lingva problemo en Eŭropo. Multaj esperantistoj voĉdonis tie por Esperanto. Nijl invitis al ni viziti la paĝon kaj voĉdoni por nia lingvo. (La adreso estas <http://derstandard.at/?url=?id=2375931>. Klaku en la cirklo apud “esperanto”, poste klaku sur la butono “abstimmen”.)

Je la sepa kaj kvardek komenciĝis la programo de la vespero: Jon LIECHTY kaj Tomaso MORGAN muzikis por ni, per piano kaj kontrabaso respektive. La grupo kantis kun ili multajn kantojn, inkluzive kompreneble “La Esperon”.

Je la 9-a horo Stuart fermis la kunvenon. ★  
Protokolis: Jeff BLAKESLEE

### IBM Plaza

La 2-an de aprilo deklinu gesperantistoj neformale kunvenis ĉe IBM Plaza por babilo. Oni diskutis kion fari por la venonta Jarkongreso de ELNA en julio 2006. ★

– Tom ECCARDT



### Historio de la Esperanta movado en Novjorko – 3-a parto

Anstataŭ ol priparoli la biografion de pliaj elstaraj geesperantistoj, la tria parto de mia historio de la Esperanto-movado en Novjorko temos pri la tri skismoj en la landa movado, ĉar jam trapasis historie sufiĉe da tempo. En la unua parto, mi jam pritraktis la unuan skismon, kiam Max Talmey kaj Andrew Kangas, du oficistoj de novjorka klubo, decidis, ke speco de Ido estas pli bona ol Esperanto kaj kaŭzis dividon en la loka klubo. Malkiel ĉe la aliaj skismoj, ĝia kaŭzo venis el eksterlando, ĉar Ido inventiĝis en Eŭropo, kaj kelkaj novjorkaj esperantistoj simple decidis sekvii novan movadon. La du aliajn skismojn kaŭzis usonanoj novjorkaj.

Ironie, unu el miaj fontoj pri la dua skismo estis partoprenanto en la tria, kaj skribis multe pli International Auxiliary Language Association (IALA), tamen tre kritike. William Salzbacher, Ph.D., fakte aludas ankaŭ al la unua skismo, dirante:

*en 1924, kiam internaciaj projektoj estis mirindaj, rezulte de la Esperanto-Ido skismo, IALA organiziĝis por krei interkonsenton inter la konkurencaj sistemoj. En sia “Skizo de Programo,” 1924, adoptita de la konsilanta komitato de IALA kaj ties estraro, ĝi deklaris (p.13): “La Asocio (IALA) havas neniun intencon disvolvi aŭ promocii novan lingvon. Rilate al malsamaj sistemoj, ĝia funkcio estas nur servi kiel neŭtrala kontrolejo por studado kaj informo.”*

[tradukita el la angla]

La fondinto de IALA estis la esperantistino Alice Vanderbilt Morris, pranepino de Cornelius Vanderbilt, la fama kaj riĉa industriisto. Alice estis edzino de David Hennen Morris, kaj la paro estis ankaŭ membroj de la Lingvistika Societo de Ameriko. Ŝi kutime uzis la nomon Mrs. Dave H. Morris, spite sian faman praavon. Ŝajnas, ke Alice havis sufiĉe da mono, ĉar hodiaŭ travivas Alice V. and David H. Morris Memorial Fund, kiu subvencias ankoraŭ lingvistikajn

(daŭras sur paĝo 2)

## E-movado en Novjorko

(daŭras de paĝo 1)  
simpoziojn.

Jam en la lasta parto mi menciis la benefician vespermanĝon ĉe Cornell Club kiun okazigis gesinjoroj Fisher kie Alice estis honora gastino en 1925. Estas malfacile diri, kiom ofte ŝi ĉeestis ordinaran novjorkan klubkunvenon, sed pluraj homoj konstatas, ke Alice estis flua parolanto de Esperanto.



Anchoraŭ en marto, 1933, Amerika Esperantisto raportas, ke ŝi parolis antaŭ klubkunveno ĉe "Green Witch Inn" pri siaj vojaĝoj en Eŭropo. Plue, ke Helen S. Eaton de IALA parolis tiam pri la rolo de Esperanto en la progreso de la movado por internacia lingvo. Fraŭlino Eaton estis esploristo de IALA kaj kreis la bazon de Interlingvao per sia *Semantic Frequency Dictionary*, kie ŝi listigis la plej ofte uzatajn "semantikajn konceptojn" kaj ties tradukojn en la angla, franca, hispana kaj germana. Tiu libro anchoraŭ estas havebla ĉe pluraj bibliotekoj.

Alice Vanderbilt kaj IALA instigis ne nur tiun vortaron, sed plurajn aliajn projektojn favoraj al Esperanto, faritaj de vere eminentaj lingvistoj. Ekzemple, en la malfruaj dudekaj jaroj, la fondinto de la kondukisma skolo de psikologio, Edward L. Thorndike, direktis eksperimenton, kiu montris, ke lernantoj de "reformita Esperanto" lernis kvin ĝis dekkvin fojojn pli rapide ol lernantoj de la franca, hispana, germana kaj itala en similaj cirkonstancoj. La fama lingvisto franca André Martinet (poste ĉe Columbia Universitato) ankaŭ laboris por IALA.

Komence, geesperantistoj amegis Alice Vanderbilt – en 1928 Louis Maury aludas al ŝi kiel la "gvidanta genio de IALA" kaj diris, ke ŝi parolas en flua esperanto kaj havas belan personecon. Sed laŭ Solzbacher, dum ŝi parolis antaŭ la novjorka klubo en 1933, IALA jam ŝanĝis sian politikon de direkti sendependan kaj neŭtralan esploron, kaj komencis krei sian propran lingvan projekton, Interlingvao. Solzbacher kritikis Interlingvaon pluraspekte. Kvankam poligloto eble povus legi Interlingvaon sen studi ĝin, preskaŭ neniu krom ĝia kompilanto, Alexander Gode, povis paroli ĝin. Laŭ Solzbacher, Interlingvao ne sekvis sian propran planon de elekti la plej ofte trovitan radikon inter siaj bazaj lingvoj. Kaj kiam oni sekvas tiun planon, pluraj homonimoj rezultas, kontraŭe al Esperanto.

En 1945, Solzbacher rimarkas, ke pluraj homoj kiuj ĉeestis IALA kunvenojn, kaj unue subtenis ĝin, ne subtenas Interlingvaon, inkluzive sin mem kaj George Alan Connor, nova redaktisto de Amerika Esperantisto. Li akuzis Alice Vanderbilt de esti diktatoreca, kaj diris, ke ŝi forĵetas rezultojn de esploroj kun kiuj ŝi malkonsentis. Eble li troigis, sed estas verŝajne, ke ŝi agis iasense kiel riĉulino kiu ne sciis kiel elspezi sian monon. Estas malfacile juĝi ĉu ŝi intence damaĝis Esperanton, aŭ ĉu ŝi vere kredis je In-

terlingvao. Ĉiaokaze, Alice mortis en 1950, ĵus antaŭ la finredaktadon kaj publikadon de Interlingvao. Ŝia familio malmultigis sian financon subtenon de Interlingvao, kaj sen tiaj fondusoj, profesiaj lingvistoj malpli interesiĝis pri la projekto. Kiel Ido, Interlingvao ne tute formortis, sed ĝi neniam superis Esperanton. Bonŝance, la paperojn de IALA kune kun pluraj ties libroj pri interlingvistiko heredis NY Public Library, nome, la Mrs. Dave H. Morris kolekto.

Doktoro Solzbacher ofte estis partizana, kaj ĉiam havis fortajn opiniojn, elbe parte pro tio, ke li laboris ĉe la usona propaganda radio-elsendejo, Voĉo de Ameriko. Solzbacher malamegis komunismon, kaj ofte raportis pri la subpremadon de Esperanto kaj libereco en Orienta Eŭropo kiam li verkis artikolojn kaj helpis redakti Amerikan Esperantiston, la voĉon de la tiama usona esperanto organizaĵo, Esperanto Asocio de Norda Ameriko (EANA). Verŝajne ĝia juna redaktisto George Alan Connor estis influita de li. Connor samtempe estis ĝenerala sekretario de EANA. Lia edzino, Doris Tappan Connor, estis bonega esperantisto kaj multe laboris kun li por la movado.

Gesinjoroj Connor kreis perpoŝtan kurson kun ok diskaj. Ili verkis *Say it in Esperanto*, unu el serio de fremdlingvaj frazlibroj. Kaj ili verkis *Esperanto, the World Interlanguage*, plurparta libro simila al la nuna libro de David Richardson. En printempo de 1951, Doris eĉ aperis ĉe la WCBS radio programo "Hits and Misses." La paro vere estis gesinjoroj Esperanto en Novjorko, kaj tia familia sinteno estis populara en la postmilitaj jaroj. Fakte, ili revivigis la tutan usonan Esperanto-movadon, kiu preskaŭ malaperis en la malfruaj tridekaj jaroj. Estis ironie, ke homoj kiuj multe fortigis la usonan movadon finfine preskaŭ detruos ĝin.

Alia eco de la postmilitaj jaroj estis markatismo, furioza kontraŭkomunismo, nomita laŭ la usona senatano Joseph McCarthy. Tiu senatano kontraŭleĝe persekutis usonajn civitanojn, kalumniante homojn kiuj nur konis eks-membrojn de la usona komunisma partio. George Alan Connor uzis similajn metodojn. Li kaj Solzbacher konstante kritikis Ivo Lapenna, jugoslava prezidento de UEA, eĉ akuzante lin de esti komunisto. Ŝajnas, ke li faris la samon kontraŭ usonaj membroj de EANA.

En 1951 Connor kaj Solzbacher komencis redefini la signifon de la "neŭtraleco" de Esperanto. De 1951 al 1955 la kovriloj de Amerika Esperantisto havis nur patriotismegajn temojn: statuo de libereco, libereca sonorilo, citaĵo de Zamenhof pri Usono, "lando de libereco." Samtempe Connor akiris tiom da aŭtoritato super EANA – li eĉ persone akiris la libroservon – ke li iĝis diktatoro. Li regis la usonan movadon de la centra oficejo, lia apartamento ĉe 114 W. 16 St. Li resendis la realiĝilojn de EANA anojn kiujn li konsideris malamikoj. Finfine en 1956, UEA eksmembris Connor pro liaj kalumnioj. EANA respondis, eksmembrigante la tutan organizaĵon de UEA. EANA tuj

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!  
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Aprilo 2006**

**21**

### ESNY KUNVENO

Mikaelo Bronŝtein parolos  
pri "SEJM legendara"

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

**Majo**

**7**

### Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza

(Limdato por kontribuadoj por Prismo 154)

### ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

**19**

### United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A  
(between Bowling Green and Exchange Place)

### "IBM" Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC  
Street level, in the Atrium

enkondukis amendon al sia konstitucio: EANA akceptos nek komunistojn nek aliajn kiuj subtenas la renverson de la usona registaro.

Sed al UEA ne mankis usona movado: jam en 1952 ĉe la jarkongreso en Sacramento, Kalifornio, oni kreis la novan organizaĵon ELNA por eksigitoj de EANA. Iom post iom la membraro de EANA malmultiĝis dum tio de ELNA kreskis. La membraro de la novjorka klubo forlasis ĝin (ĝi estis branĉo de EANA) kaj reorganizi la nuntempan klubon. Connor klopodis revivigi la malnovan, kaj devis rapide trejni novulojn. Hazarde, en 1957 okazis EANA kongreso en Newark, kaj ELNA kongreso en Nojorko! EANA perdis kontakton kun la eksterlanda movado kaj finfine ne havis novaĵojn de la usona. Do la renomita American Esperanto Magazine devis temi pri gramatiko aŭ pri fremdlandaj vidindaĵoj kaj la vojaĝoj de gesinjoroj Connor. En 1963, la paro translokiĝis al Oregono kaj la revuo aperis pli kaj pli sporade ĝis la lasta numero en 1967. Kurioze, restis bruklina adreso de la libroservo ĝis la fino. Ĉu vi, kara leganto, scias kiu estris tiun servon? Simile al Alice Vanderbilt, Connor lasis sian esperantan librokolekton al institucio, Universitato de Oregono. Solzbacher mortis en 1991. Fakte, li parolis pri VOA antaŭ ELNA kongreso en 1959, sed "nur por la grupo en la ĉambro, nur kiel dungito de la usona registaro." ★

– Tom ECCARDT



## ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041  
[http://www.geocities.com/esperanto\\_nyc](http://www.geocities.com/esperanto_nyc)

**Prezidanto**  
Stuart Green  
(631) 751-5683

**Korespondanta Sekretariino**  
Rochelle F. Grossman  
(718) 457-1490

**Protokolisto**  
Jeff Blakeslee  
(718) 383-2715

**Vicprezidanto**  
Nijl Blonstein

**Kasistino**  
Sofiya Soskina  
(914) 738-6084

**Program-Direktoro**  
Thomas Eccardt  
(212) 477-6516

## Novjorka Prismo

Numero 153 – Aprilo 2006  
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

**Redaktoro**  
Jim Medrano  
(212) 982-5029

**Subredaktoroj**  
Thomas Eccardt  
Nancee Medrano

**Desegnistino**  
Mary Pulley

Sendu kontribuadojn al:  
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103  
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York